

### **Ne nur detektiva novelo sed ankaŭ ...**

La ĉefrolulo de la novelo 'Amo kaj malamo', s-ro Plamen Folov estas riĉulo kun du grandaj vendejoj, vinfabriko kaj hoteloj, sed lia riĉaĵo ne estis gajnita laŭ normal vojo, sed fare de politika intrigo.

Li havis feston memore al sia kvardekjariĝo, post la festo ĉe la pordo troviĝas papereto sur kiu estas notita jene: Redonu tion, kion vi akaparis aŭ donu al ni 100,000 eŭrojn. Ni telefonos al vi kie kaj kiel vi donos al ni la monon. Ne informu la policon! Ne forgesu - vi havas infanojn! De tiam lia vivo fariĝas maltrankvila kaj finfine li estas mortpafita de iu... Kiu pafis lin? Pro kio li estis pafita?

Kia estas la stilo de Julian Modest? Lia novelo estas facile legebla eĉ por azianoj. Honeste dirite ĝenerale literaturaĵoj el Eŭropo estas malfacile kompreneblaj por aziaj komencantoj, ĉu pro la diferenco de kultura fono, aŭ ĉu pro komplika esprimmaniero de eŭropanoj. Sed la stilo de Julian estas facile akceptebla sen ia malfacilo eĉ por tiuj, kiuj finis bazan kurson de Esperanto laŭ mia sperto. Mi ne diras ke liaj noveloj estas simplaj kaj monotonaj sed male la liaj igas legantojn pensi profunde kaj ĝiaj aromo kaj sento restas longe ĉe la koro de legantoj. Iam Julian diris, ke 'La verkistoj rakontas okazintaĵojn, kiuj emociis lin kaj igis lin mediti pri la plej gravaj problemoj de la homa vivo: la amo, la amikeco, la strebo al la bono kaj justo, la deziro vivi kaj venki la malfacilaĵojn en la ĉiutaga vivo'. Kiel lia mencio, la temoj de liaj noveloj ne estas fore de ĝenerala vivo sed troviĝas ĉirkaŭ nia ordinara vivo.

Mi rekomendas tiun ĉi novelon al jenaj esperantistoj;

Unue, tiuj, kiuj ŝatas legi originalan novelon en Esperanto, aparte al la esperantistoj, kiuj suffice bone komprenas bazan gramatikon de Esperanto, povos legi tiun ĉi novelon konsultante vortaron. Ankaŭ por tiuj, kiuj serĉas detektivan novelon, mi rekomendas tiun ĉi novelon.

Due, mi konsilas al Esperanto-instruisto tiel, ke vi rekomendu tiun ĉi novelon al viaj kursanoj por tiri atenton de ili al Esperanto-literaturaĵo kiom Esperanto estas esprimriĉa kaj entenas vortjuvelojn en ĝia vortprovizo.

Oni diras, ke literaturo estas floro de la lingvo. Kiel maniulo de la novelo de Julian mi sendas aplaŭdon je lia senpaŭza verkado por riĉigi Esperanto-kulturon. Mi atendadas lian novan novelon.

*(LEE Jungkee el Koreio)*

*Julian Modest. Amo kaj malamo. Eldonejo Libera, 2019, 110 paĝoj*